



SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1993:5

*Post-
someraj
raportoj*



La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Oktober 1993 • 81-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör/redaktoro:

Per Aarne Fritzon,
Västertorpsvägen 154,
129 44 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Frågor om prenumeration o.dyl.: Esperanto-Centro, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1993

Prenumeration 1994: 150 kr. Gävoprenumeration till utlandet: 80 kr. Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Brunngatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34, fax: 08-20 72 20

Ny adress dec. 93: *Vikingagatan 24,*
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00,
fax 08-34 08 01

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 17.30-19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1994:

Direktansluten medlem 150 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Møllevångsgatan 20B,
Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj; torsdagar kl. 17-18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala

SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen,
tel. 08-777 41 75

Vice ordförande: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby,
tel. 08-590 882 10

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-41 22 05

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-17 36 87

Styrelseledamot: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Styrelseledamot: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, 641 37 Katrineholm,
tel. 0150-523 87

Suppleant: Leif Nordenstorm, Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,
tel. 0921-123 54

Suppleant: Anita Bergh, Hasselgatan 60, 2 tr, 194 37 Upplands Väsby,
tel. 08-590 858 72

Adjungerad: Aira Kankkunen, Dr Forselius gata 60, 413 26 Göteborg,
tel. 031-18 79 82

DONACOJ

Estrid Lind, Krylbo 200. Lennart Svensson, Annerstad (till minne av Karl Ljungberg) 100. Ulla Luin, Tyresö 675. Thordis Samuelsson, Jönköping 355. Jack Snarberg, Jönköping 100. Sven Edenby, Gävle 55. Malmö Esperantoförening (memore al nia membro Sven Sundin) 300. Ingemar Nordin, Stockholm (till minne av Roy Auer) 100. Södra distriktet av SEF (memore de Walter Bjerkemo) 100. Sigurd Olsson, Strömsnäsbruk (till minne av Walter Bjerkemo) 300. Krome anonymaj donacoj aŭtoĝire.

DAR-ES-SALAAM

Esperantoklubben i Stockholm 500.
William Malmsten, Göteborg 200.

KLUBO MIL

Membroj ĝis nun por 1993:

- | | |
|----------------------------------|------|
| 1. Sten Broman, Skövde | 1000 |
| 2. Erik Svärd, Malmö | 1000 |
| 3. Klubo Esperantista de Malmö | 1000 |
| 4. Helsingborgs Esperantoklubb | 1000 |
| 5. Sven Möllestad, Helsingborg | 1000 |
| 6. Gösta Hedlund, Uppsala | 1000 |
| 7. Harald Andersson, Grythyttan | 1000 |
| 8. Karl Brännberg, Västerfärnebo | 1000 |
| 9. Sigurd Olsson, Strömsnäsbruk | 1000 |

Novaj membroj povas aliĝi pagante SEK 1000 (aŭ pli) al pĝk 20 12-3.

KLUBO CENT

Gertrud kaj Torsten Lund, Malmö 200.
Olle Olsson, Lund 100. Britta Lindeberg, Degeberga 100. Ruben Enocson, Solna 100.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Novaj donacoj estas bonvenaj al SEF-poŝtĝiro 20 12-3

EsperantoCentro

ŝanĝos adreson en decembro 1993:

Vikingagatan 24
113 42 Stockholm
(apud S:t Eriksplan)

SEF-kongreso en trista vetero


Ĉu pro la aĉa vetero aŭ pro la geografia situo, la urbo Upsalo ne sukcesis altiri la buĝetitajn 120 partoprenantojn al la SEF-kongreso. Kaj tamen ni estus havintaj kaŭzon kalkuli pri eĉ 130 personoj aŭ pli, ĉar la programkontribuantoj estis de alta kvalito. La 100 personoj, kiuj efektive venis, fariĝis kontentaj.

Knara kongresejo

Kiel kongresejon la LKK elektis *Värmlands Nation*, t.e. la ejon de la vermlandaj studentoj, kaj tiel ni povis okupi kvaŭzaŭ propran domon. La lokaloj senprobleme glutis la kongresanaron, sed la plankoj knare plendis je ĉiu paŝo, precipe kiam malfruaj venintoj provis atingi liberan sidlokon por aŭskulti prelegon.

Interkona vespero

La kongresanaro kolektiĝis je la horo 18.30 por komune tagmanĝi. Du horojn poste komenciĝis la vespera programo, kaj plej unue la LKK-prezidanto **Christer Kiselman** admonis ĉiujn speciale in-



Mikaelo Bronštejn kantis proprajn kaj tradukitajn kantojn, plejparte satirajn. (Fotis: U. Luin)



Nome de la urbo Upsalo la kongreson salutis la unua vicprezidanto de la urba konsilantaro, Lars Bäckman. Sur la bildo li staras inter Christer Kiselman kaj Roland Lindblom. (Fotis: U. Luin)

vititajn gastojn prezenti sin al la publiko:

El *Tartu* en Estonio venis du invititaj virinoj, kiuj esprimis grandan ĝojon pro la ebleco viziti svedajn esperantistojn en la ĝemela urbo Upsalo. Same ĝojaj estis du invititaj virinoj el *Vilnius*, Litovio.

El Nederlando venis **Hans Erasmus**, invitita por prelegi pri lingvaj problemoj ene de la Eŭropa Komunumo. Li laboras en grupo provanta informi pri esperanto al oficistoj kaj aliaj en Bruselo.

La aktoro **Jerzy Fornal** el Pollando ne havis problemon prezenti sin, ĉar li estas jam konata pro pluraj antaŭaj vizitoj al Svedio. **Zofia Fornalowa**, lia edzino, ankaŭ estas tre konata por la sveda esperantistaro kaj ĉi-foje venis por prelegi pri la teatra arto en la esperanto-movado.

Post la prezentoj sekvis la distra parto de la vespero. **Ĵomart** kun voĉo kaj gitaro kaj **Nataŝa** kun voĉo kaj bekluto ĝojigis nin per novaj kantoj kaj melodioj.

Alia esperantisto alveninta el la granda lando oriente de la Balta maro estis **Mikael Bronštejn**. Dum la lastaj jaroj li fariĝis pli kaj pli konata por la publiko

ekster Ruslando. Kvankam laŭprofesie inĝeniero, li havas grandan talenton traduki poezion kaj verki proprajn tekstojn. Multaj el liaj kantaĵoj estas satiraj kontraŭ la iama Sovetunia gvidantaro. Lia satira talento ankaŭ trafis verkon de la poet-kolego **Ĵomart**, sed la satiro estis amuza kaj esprimis amikecan etoson.

Inaŭguro

Meze de la kongresa programo, iom malfrue, okazis la iom solena inaŭguro kun partopreno de urba reprezentanto.

Christer Kiselman enkondukis per prelegeto koncerne du eblajn manierojn rigardi esperanton. Li avertis kontraŭ senkritika admiro de la "majstro", ĉar Zamenhof mem ne volis stari super aliaj esperantistoj, sed inter ili. Kiselman atentigis pri la fakto, ke Zamenhof multe fumis, kio do montras, ke ni ne imitu iun majstron en ĉio...

La SEF-prezidanto **Roland Lindblom** provis per ekzemploj montri, ke multaj bonintencaj homoj inventis bonaĵojn, sed ke la homoj kiel kolektivo ne ĉiam pretas utiligi tiujn bonaĵojn. Li ankaŭ

montris al homaj atingoj, kiuj per helpo de tekniko ebligas rapide veturi, sendi sonojn kaj bildojn kaj telefone paroli kun homoj senkonsidere al la distanco. Tamen... neniuj inventis teknikon, kiu ebligas lerni lingvon centoble pli rapide ol antaŭe, kaj evidente neniuj antaŭvidas tian teknikon. Esperanto ne estas aparato aŭ iaspeca teknikaĵo, sed ĝi estas la sola ebla solvo sur la lingva kampo por faciligi internacian komunikadon.

La politikisto **Lars Bäcklund** de la konservativa partio prelegis entuziasme kaj "pentris" interesajn bildojn el la historio de Upsalo, kaj konvinkis nin ankaŭ pri tio, ke Upsalo hodiaŭ estas la plej bona kaj interesa urbo en Svedio. Por tio li ricevis ne nur dankon, sed ankaŭ la libron *Pipi Ŝtrumpolonga*.

Fine de la inaŭguro aŭdiĝis kelkaj salutoj de eksterlandaj partoprenantoj. Neatendite, sed des pli ĝojiga, estis la vizito de **Synnöve Mynttinen**, prezidanto de la Esperanto-Asocio de Finnlando. Ŝi estas kuracisto kaj kombinis studviziton al mal-sanulejo en Upsalo kun vizito al nia kongreso.

Jarkunsido

Roland Lindblom malfermis la kunsidon kaj post elekto de prezidanto por la kunsido transdonis la martelon al **Bertil Andreasson**. Por protokoli oni elektis **Gertrud Lund**.

Bertil Andreasson ĉi-jare forlasis la estraron kaj nova sur lia loko nun estas **Agneta Emanuelsson**. Agneta dum la pasintaj du jaroj estis estrara anstataŭanto, kaj tiun lokon nun transprenis **Anita Bergh**.

Roland Lindblom estis reelektita prezidanto kaj nun komencis sian trian jaron sur tiu posteno.

Revizoroj ofte restas longe sur siaj postenoj, sed niaj **Åke Blomberg** kaj **Bertil Bengtsson** ambaŭ mortis dum la lasta periodo. La antaŭaj anstataŭantoj **Torsten Lund** kaj **Nils-Erik Kristoferson** transprenis la postenojn kaj novaj anstataŭantoj fariĝis **Curt Frisk** kaj **Carl-Erik Ohlsson**.

La elektoprepara komisiono ricevis novan trionon post la retiriĝinta **Märtha Andréasson**, nome **Anita Dagmarsdotter**. Restas **Lisbeth Andreasson** kaj **Aino Åberg**.

Ekonomio

La kasisto **Börje Andersson** raportis, ke la ekonomia situacio estas iom malbo-



Anita Bergh elektigis nova anstataŭanto en la SEF-estraro, kaj sur la bildo ŝi partoprenas sian unuan estrarkunsidon apud prezidanto Roland Lindblom. (Fotis: U. Luin)

na. Parte pro alta lukosto de Esperanto-Centro, kaj parte pro la fakto, ke la membraro iom malkreskis.

La estraro proponis altigon de la membrotizo per 5 kronoj por plenkreskuloj ricevantaj *La Esperon*. Venis ankaŭ propono pri altigo je 15 kronoj, sed la estrara propono gajnis per 22 voĉoj kontraŭ 9 kiuj subtenis la pli altan membrotizon.

Kontaĝa muziko

Dimanĉe vespere, post longega bankedo, okazis la plej gaja kaj amuza programero de la tuta kongreso.

Esperantisto **Kaj Stridell** ne nur gvidis la orkestron *Trattbandet*, sed ankaŭ donis interesajn komentojn pri ĉiu ludota muzikpeco. Temis pri "trad-ĵazo", la iom malnovtipa. Se mi diras, ke tiu ĉi orkestro el Västerås gajnis plurajn konkursojn inter orkestroj samtipaj, vi certe komprenas, ke ni kun ĝojo kaj energio dancadis ĝis la lasta tono.

Homoj, kiuj kutime movas sin digne kaj trankvile, aĝaj homoj, kiuj kutime malaperas frue por bone dormi – ĉiuj forĝesis pri digno kaj dormo, kiam la viglaj melodioj gaje fluis el la diversaj funeloj.

Neniam mi vidis tian dancemon en iu ajn kongreso. "Ĉirkaŭsaltado" estas pli bona vorto ol nur "dancado" por priskribi, kio okazis sur la planko. "Kie vi trovis tian orkestron?" multaj demandis.

Mi devas aldoni, ke **Kaj Stridell** ne nur saksophonis, sed ankaŭ kantis – en esperanto. Li mem tradukis kelkajn tekstojn en esperanton ĝuste por amuzi nin, kaj li sendube sukcesis!

Roland Lindblom



Torsten Lund jam de jaroj estas tre ŝatata aŭkcianto de malnovaj libroj dum la SEF-kongresoj. Ĉu li persvadis Ole Hansen aĉeti? (Fotis: U. Luin)

Komunikado en la Eŭropa Komunumo

Pri tiu temo prelegis dum la SEF-kongreso en Upsalo **Hans Erasmus** el Nederlando. Li estas juristo kaj laboras kiel direktoro de esplorgrupo ĉe la Komisiono de Eŭropa Komunumo.

Ekster la prelego li rakontis, ke li komencis lerni esperanton pro sia filo. La filo fariĝis malkontenta en la gimnazio, ĉar tie oni devis studi plurajn lingvojn, kaj lingvoj estas malfacile lerneblaj. Li demandis, ĉu ne ekzistas iu pli facila lingvo. La patrino sciis, ke troviĝas ia lingvo esperanto, kaj kontaktis informojn. Rezulte de tio, la filo kaj la edzino de Erasmus ekpartoprenis kurson. Li mem komencis studi lernolibron dum la trajnvojaĝoj al la oficejo. Tio okazis en 1985.

Laŭ Erasmus, la homoj en Bruselo renkontas diversajn lingvojn ĉiutage kaj konscias pri la lingvoproblemo, sed neniu ŝajnas havi ajnan intereson diskuti aŭ esplori ĝin.

Li rakontis pri la kostoj de komunikado en EK hodiaŭ. Unualoke inter la rektaj kostoj troviĝas kostoj por tradukado interne de la EK-instancoj, sed ankaŭ en ĉiuj kongresoj, seminarioj, simpozioj kaj laborgrupoj kiuj rekte rilatas al EK. Kostoj por tradukado ne nur koncernas la senperan tradukadon dum kunsidoj, sed ankaŭ la tradukadon de ĉiuj raportoj kaj dokumentoj.

Dualoke troviĝas nerektaj kostoj de lingvolernado. La partopreno en EK-laboro devigas homojn studi diversajn lingvojn.

Trialoke aldonendas la kostoj pro la lingva diverseco en ĉiuj komercaj rilatoj inter la landoj.

Larĝasence la diversaj kostoj por tradukado kaj interpretado ene de la EK-instancoj sumiĝas je pli ol unu miliardo da ekuoj jare.

Erasmus estas membro de speciala grupo, kiu klopodas influ i oficistojn kaj aliajn pri la lingvaj problemoj kaj la solvo per esperanto. La unua paŝo en la strategio de la grupo estas vekigi konscion, ke entute troviĝas lingva problemoj. Poste oni volas proponi, ke EK esploru la problemon en iu komisiono. Nur post tio, kiam EK fine konfesis, ke ekzistas granda kaj multekosta problemoj, venos la propono, ke esperanto estas unu el la


eblaj solvoj de tiu problemoj.

La "premgrupo por esperanto", en kiu membras Erasmus, nun venas kun rekomendoj por ni esperantistoj en nia informala laboro:

1. Atentigu, ke en la mondo ekzistas kreskanta interkomunikadproblemo (lingva).
2. Agadu por la solvo de la lingva problemoj en internaciaj rilatoj por faciligi la komunikadon.
3. Disvastigu la uzadon de esperanto por montri, ke ĝi jam funkcias kiel neŭtrala internacia komunikilo, kaj sekve povus esti la solvo.

Ne diru, ke esperanto estas la solvo, sed ke ĝi estas ebla solvo. Ne organizu naciajn, sed nur internaciajn kongresojn. Uzu vian nacian lingvon je naciaj kaj lokaj aranĝoj. Uzu esperanton nur, se vi en la klubo ekzercas lingve aŭ kiam vi renkontas alilandajn esperantistojn. Ne kantu la himnon dum aranĝoj, kie nur samlandanoj kunvenas. Alie, la ekstera mondo nur rigardos vin kiel sekton de stranguloj aŭ kiel batalgrupon por io.

Komencu diskuton pri esperanto nur, kiam iu petas tion. Emfazu pli la lingvoproblemon ol vian solvon. Ne eniru diskuton, se nur troviĝas kelkaj minutoj je dispono: esperanto kaj la demandoj ĉirkaŭ ĝi estas tro komplikaj por kelkminu-



Hans Erasmus parolis pri la lingvaj problemoj de la Eŭropa Komunumo, kies organizon li kiel oficisto konas de interne. (Fotis: U. Luin)

ta diskuto. Ne diru, ke esperanto estas la lingvo de la paco. Ne ofendu aliajn lingvojn; precipe ne parolu pri la imperialismo de la angla lingvo.

Tiuj ĉi rekomendoj evidente ŝokis kelkajn el la aŭskultantoj, kaj precipe **Zofia Fornalowa** forte kontraŭstaris ilin en la posta diskutado. Aliaj komprenis, ke oficistoj laborantaj en EK devas agadi formale kaj delikate.

Tamen – neniu povas diri, kiu vojo estas la plej ĝusta, ĉu... ?

Roland Lindblom

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

La tria kajero (K – M) nun havebla.
120 kr kun sendkostoj.

Eldona Societo Esperanto,
poŝtĝiro 578-5



UK sub varmega Valencia suno

La gazeto aperanta dum la kongresaj tagoj portis la nomon *Valencia Suno*. Tiu nomo diras ĉion pri la vetero dum la kongreso. Mi komprenas, kial multaj svedoj kutime troveblaj en la kongresanaro ĉi-jare restis hejme. La lokaloj en nia kongresejo, Palacio de la Muziko, ĉiam estis plaĉe malvarmetaj, sed tiuj de la lernejo situanta je dekminuta promendistanco nur regalas nin per varma akcepto. Sola kontraŭrimedo estis svingado de ventumilo, kaj do ĉiu kongresano diligente uzis sian ricevitan ventumilon.

Senpompa inaŭguro

Hispanaj altranguloj loĝas en Madrido, ankaŭ ambasadoroj. Venis nur kelkaj eminentuloj el Valencio por afable saluti nin. Do, pro manko de altranguloj kaj dignaj salutparoladoj, oni aranĝis la salutadvicon de landaj reprezentantoj jam nun, dum la inaŭguro. Pro tio mi devis sidi inter aliaj salutontoj malantaŭe sur la podio dum la tuta inaŭguro. Eble ŝajnas esti avantaĝo sidi surpodie, sed ĉi-foje estis absoluta malavantaĝo, ĉar la akustiko estis tre malbona. Unue mi pensis, ke nur mi havas problemon aŭdi, sed mi demandis aliajn ĉirkaŭ mi, kaj ili spertis la samon.

Akustiko vere estas stranga fenomeno. Unue ni konstatis, ke ni kaptas eĉ ne unu vorton el la parolado de la LKK-prezidanto **Augusto Casquero**; ni preskaŭ nenion aŭdis, kiam prelegis **Hans Bakker**; ni duone bone perceptis, kion diris **John Wells**. Imagu, ĉu ni komencis miri ĉe la fino, kiam **Duncan Charters** prelegis pri la kongresa temo – ni aŭdis kaj bone perceptis ĉiun vorton tre klare!

Dum la semajno fariĝis evidente, ke la akustiko en la granda salono ne estis sufiĉe bona. John Wells atentigis ĉiujn prelegantojn pri la neceso konscii, ke temas pri prelego kaj tial paroli klare kaj ne rapide. Tiurilate estis interese konstati, ke la plej klarvoĉaj prelegantoj venis el Britio, aŭ almenaŭ el angleparolantaj landoj, ĉar mi volas envicigi ankaŭ la novzelandanon **Stefan MacGill** post personoj kiel **Humphrey Tonkin** kaj Dun-



UK-dancado 1: Laŭ ĉiuj atestoj, la Nacia Vespere de la valencia UK estis io eksterordinare vidinda. Facetoj de la popoldanca tradicio en diversaj partoj de Hispanio prezentiĝis per tertaj artistoj. (Fotis: A. Kankkunen)

can Charters. En tiu grupo troviĝis ankaŭ John Wells. Post la supre menciita admono de Wells okazis, ke eĉ la italo **Michela Lipari** dum momento komprenis la gravecon paroli klare.

Komitato

La kunsidoj de la "UEA-parlamento" estas malfermaj por ĉiuj, sed ekstreme malmultaj kongresanoj venas por aŭskulti. Pli strange estas, ke multaj elektitaj komitatanoj entute ne venas al la kongresoj. Ofte mankas ĉirkaŭ 40 el la elektitaj reprezentantoj

La plej interesa afero ĉi-jare estis la longa diskuto pri novaj celoj, pri nova strategio kaj novaj argumentoj por lerni esperanton. Dum la lastaj 2–3 jaroj, UEA povis konstati, ke la membronombro malkreskis konsiderinde, kaj la malkresko okazis en la orienteŭropaj landoj, kiuj antaŭe estis la plej membroriĉaj.

Preskaŭ ĉiuj komprenis, ke UEA kaj la tuta esperantistaro devas bone pripensi la situacion kaj trovi novajn metodojn vekti intereson pri la lingvo.

Alia diskuto koncernis la estraron de UEA. Ĉu ili partoprenu ankaŭ en la in-

forma laboro direktita al la ekstera publiko? La respondo fariĝis jes, sed kun la limigo, ke ili faru nur tian informadon, kian aliaj instancoj ne povas efektiviĝi.

Mark Fettes, kiu en la estraro respondecas pri informado, kaptis la okazon sciigi, ke la UEA-buĝeto ne havas monon asiginitan speciale por informlaboro. Li jam ene de la estraro proponis enkondukon de aparta informa titolo en la buĝeto, sed la aliaj ne akceptis tion. Nun li petis la komitaton diskuti tiun demandon. Rezulte, Fettes ricevis fortan subtenon por sia starpunkto.

La komitato akceptis la peton de Esperantoasocio de Urugvajo denove fariĝi membro de UEA. La urugvaja asocio forlasis UEA-n en 1974, post la kongreso en Hamburgo, kie **Ivo Lapenna** perdis la prezidantecon.

Delegita Reto

En speciala kunsido okazis diskutoj pri la sistemo de delegitoj. Venis proponoj, ke UEA ŝanĝu la regularon. Oni volas enkonduki novajn nociojn kiel "regiona delegito" kaj "loka delegito". Alia ŝanĝo temas pri la daŭro de delegiteco. Oni

volas enkonduki ian kontrolan metodon por certigi, ke la delegita reto vere bone funkciu. Proponite estis, ke oni ĉiun trian jaron kontrolu la liston de delegitoj kaj plilongigu la delegitecon nur de tiuj, kiuj bone funkcias. Nomumo de faka delegito devos okazi en konsento kun la Direktoro de la Centra Oficejo (**Osmo Buller**).

Sceneja arto

La nacia vespero estis la plej impona, ĉar hispanoj scias muziki kaj danci. Orkestro 60-persona ludis tipe hispanan muzikon kaj la posta aplaŭdado atestis pri la aprezo de la publiko. Ekstra muzikpeto ĉe la fino vekis specialan simpation, ĉar oni ludis la Himnon.

Sekvis tri danctropoj, kiu brilstile kaj elegante karesis la okulojn. Iliaj kalkanumoj kaj kastanjetoj forte kaj tre ritme impresis. Estis sendube folkloro festo kun gaja kaj bela muziko el diversaj regionoj de Hispanio.

La granda scenejo estis tre taŭga por la nacia vespero, sed kiam solartistoj aperis en aliaj vesperoj, la tro granda spaco ĝene efikis. Ankaŭ la ne tre bona laŭtparolila sistemo kaŭzis, ke multaj malbone perceptis ĉion diritan. Tiuj, kiuj jam spektis prezenton de **Fraŭlino Barlaston** en ekz. la Viena kongreso, certe samopinias. Aliaj, do la plej multaj, certe ĝuis la kantadon kaj ŝercojn de la "fraŭlino". Ni ne forgesu **Elena Puŝova**, kiu piane akompanis.

La aktorino **Julia Castiau** el Belgio prezentis monologon de **Dario Fo**, la rolo prezentas sin kiel la Jesu-infanon. Bona aktorado, komika enhavo, sed bedaŭrinde tro longa afero. Ankaŭ nun ĝenis la problemo pri akustiko. Tia problemo speguliga sur la vizaĝoj de la spektantoj. Kelkaj forte ridas, aliaj per torditaj trajtoj klare montras, ke ili ne kaptis la humuraĵojn.

El Kubo venis aktorino, kiun la kubaĵoj ofte vidis sur ekranoj filmaj kaj televidaj: **Georgina Almanza**. Ŝi prezentis dramon monologon, kaj en alia tago programon el poemoj kaj kanzonoj de latinamerikaj poetoj. Ŝia prezento donis pli intiman senton, malgraŭ la granda scenejo, ĉar oni uzis malfortan lumon. Estis interese konstati, ke la gitaristo, kiu kelkfoje akompanis ŝin, estas la prezidanto de la Kuba Esperanto-Asocio, **Julian Hernández**.

Brita teatrotrupo prezentis la komedion "Parencoj provizore". La brita kom-

ediisto **Alan Ayckbourn** verkis kaj **William Auld** tradukis. La tradukaĵo certe estis de bona kvalito, sed kion fari, se la originala teksto estas tre magra. Sufiĉas diri, ke minimume triono el la spektantoj malaperis dum la paŭzo.

Okazis ankaŭ aliaj programeroj, sur kaj ekster la scenejo. Inter la muzikaj artistoj troviĝis ankaŭ **Mikael Bronŝtejn**.

Subĉiela interkona

Almenaŭ io nova sub la suno: La interkona vespero okazis apud la maro, kelkajn kilometrojn norde de Valencio. Ekde la 18-a horo apud la kongresejo pleniĝis buso post buso kaj transportis la kongresanaron al liberaera dancejo. La allogilo konsistis el hispana paeljo,

kuirita sur rekorde grandega fritpato kun kapacito por 2000 porcioj. Do, la manĝo sufiĉis por ĉiuj, ĉar nur 1870 personoj aliĝis al la kongreso. La giganta ujo pezis tunon kaj la diametro estis kvarmetra. La kuirado estis longedaŭra afero, sed la homoj dumtempe babilis kaj ĝuis la bonan veteron. Unue oni vicostaris por ricevi porcion da paeljo, poste denove por ricevi glason da sangrio. Ĉio bone gustis kaj ĉiu ricevis lignan kuleron kiel memoraĵon de la vespero.

La lasta atendo koncernis la busojn. Imagu la interpremadon, kiam 1500 homoj longe atendis kaj la busoj komencas veni...

Roland Lindblom



UK-dancado 2: La kongresa balo dancigis la kongresanojn mem. Oni laŭdis bonan orkestron kaj kontentige vastan lokalon. (Fotis: A. Kankkunen)

Bli delägare i Esperantoförlaget!

Eller öka ditt engagemang. Teckna dig för nya andelar och underlätta vår utgivning av esperantoböcker, kassetter m.m. Andelsbevis à 500 resp. 1000 kronor.

Betalning till Esperantoförlaget, postgiro 578-5.

Tra la lando

Printempa regiona festo en Smolando

Komence de majo okazis en Oskarshamn kunveno de la regiono Smolando-Blekingo. Samtempe prifestiĝis la unua jaro de la kluba vivo en Oskarshamn.

Inter la 28 partoprenantoj troviĝis reprezentantoj de grupoj en Högsby, Kalmar, Karlskrona, Nybro kaj Växjö, kaj ankaŭ gastoj el Bosnio, Makedonio kaj Siberio.

Husein el Makedonio kaj Ahmed el Bosnio, ne sciantaj la svedan lingvon, aparte bonvenigis la ŝancon interkompreniĝi kun svedoj. Ili donis al ni skizon de la situacio en siaj hejmlandoj kaj de siaj personaj travivaĵoj. Por ĉiuj la evento estis trafa ilustraĵo de io, kion sole esperanto ebligas.

Birgitta raportis pri rilatoj kun preĝejo en Tomsk, rezulte de nia vizito al tiu urbo en decembro 1990.

Sergej parolis pri siaj spertoj en Svedio dum jaro kiel stipendiulo ĉe la po-



Harold Brown, Inga-Maj Danielsson, Sergej Bondin kaj Husein Mifter interparolas dum la Smolanda regiona festo en majo.

polaltlernejo en Oskarshamn – kio ankaŭ rezultis de tiu vizito al Tomsk.


Harold amuze parolis pri la eksterordinaraj proponoj, pri kiuj li legis en la ĵurnaloj la unuan de aprilo.

Prezentiĝis la kanto *La lingvo de paco*, kun teksto de Sam Fritz kaj muziko de Sven Österberg, kantoro kaj komponis-

to en Växjö. Tiu kanto estis partoprenonta en la Belartaj Konkursoj de UEA.

Kerstin proponis, ke simila renkontiĝo estu aranĝita de alia klubo en la regiono, kaj Nybro invitis nin veni aŭtune.

Harold Brown



Novaj vizaĝoj: Jen du portretoj fotitaj dum la semajnfino komence de septembro, kiam SEF, SEJU kaj la regionaj SEF-representantoj havis komunan laborokunsidon en Esperanto-Centro. Maldekstre la nova SEJU-estrarano Anna-Lena Eriksson, kiu studas medicinon en Stokholmo. Dekstre Aira Kankkunen el Gotenburgo, kiu dum tiu ĉi jaro funkcias kiel eksterordinara SEF-estrarano.

Pulmerkato en forlasota Esperanto-Centro

La 18-an de septembro oni starigis en la stokholma Esperanto-Centro pulmerkato (et)on profite al SEF. La enspezoj sumiĝis je 2268 kronoj; el tio ne malpli ol 935 kronoj venis dank' al vendado de freŝa pano, kiun bakis loka samideanino Inga Nordfalk. Ŝia pano simile multe kontribuis al la profito de pli frua pulmerkato, la 1-an de majo, kiu donis ĉ. 3000 kronojn.

Kiel la plej multaj membroj certe konscias, la ĝisnuna centro en Brunnsgatan fariĝis netolereble multekosta. Oni nun preparas translokiĝon al nova, pli favor-kondiĉa ejo proksime al St. Eriksplan en Stokholmo. En la venonta *La Espero* venos pli da informoj pri nia nova centro!

Kulturkrevado Pulvobarele

Fine de aŭgusto mi iris per nokta trajno al Kopenhago por ĉeesti la kvaran **Kulturan Esperanto-Festivalon**. Post tri plenaj tagoj (kaj noktoj!) mi revenis ŝtopita per esperanta kulturo. En la festiva lejo La Pulvobarele, situanta en la kvartalo *Osterbro*, la kopenhaganoj daŭrigis la KEF-tradicion per vera kulturkrevado. Kiel kutime, la KEF estis aranĝo kun leĝera etoso kaj sufiĉe altkvalitaj programeroj. Ĉi-foje cent-kvindeko da homoj el dek kvin landoj aŭskultis kantojn de **Kajto**, **Ĵomart kaj Nataŝa**, **Ĵak le Puil**, **Persone kaj Amplifiki** – do vastan gamon ekde folkloro tra kanzonoj ĝis roko. Plue ni spektis teatron de **Krizalido**, **Jerzy Fornal** kaj **Teatro en Kofro**. La nerezistebla **FraĴino Barlaston** surprizis kaj ridigis nin, kaj krome ni kafumis, bierumis, talentumis, noktumis kaj ĝenerale svarmis en kaj ĉirkaŭ la festiva lejo.

KULTURA ESPERANTO FESTIVALO

La kvara KEF laŭ mi eble ne havis evidentan pintan prezenton, sed konservis la tradicie altan nivelon. Persone mi plej ĝuis la prezentojn de **Ĵak le Puil** (nova KEF-stelo), **Ĵomart kaj Nataŝa** (bisaj steloj) kaj la roka aglomeraĵo **Persone/Amplifiki** (ĉiam-verdaj pra-steloj). Teatro **Krizalido**, alia KEF-a institucio, nun plene transpaŝis al folklore-romantika kampo, kies fabela tono tamen estis iom ĝenata de tro vortriĉa rakontado.

KEF 4 enhavis ankaŭ prelegojn, sed tiuj ne atingis nivelon kompareblan kun la aliaj prezentoj.

Sten Johansson



La ĉi-jara Brit-skota kongreso estis bona okazo renkonti konatajn esperanto-verkistojn. Agneta Emanuelsson parolanta kun Claude Piron.

Brit-skota kongreso

Fine de majo okazis en Hamilton, iom ekster Glasgovo en Skotlando, komuna kongreso de la brita kaj skotlanda esperantistaroj. Temis pli precize pri la 77-a Brita kaj la 88-a Skota kongresoj en komuna aranĝo. Partoprenis ĝin ankaŭ tri esperantistinoj el Svedio: **Agneta Emanuelsson**, **Barbro Haraldsson** kaj **Jill Hilford**. Ni ĉiuj ĝuis neforgeseblan kongreson kaj vere plenplenan programon.

Speciale menciindaj estas la tri konataj esperanto-aŭtoroj: **Claude Piron**, **William Auld** kaj **Marjorie Boulton**.

Claude Piron, alinome **Johan Valano**, prelegis plurfoje kaj ĉiam ni estis sorĉitaj per lia oratorajo. Ankaŭ kiam li dum unu

horu parolis pri la kostoj de la diverslingveco en EK kaj plenskribis la tabulon per ciferoj, oni neniam enuis.

William Auld pritraktis tri lingvojn, la skotan, la anglan kaj la kimran, en interesa prelego. Kompreneble li ankaŭ ĉe diversaj okazoj prezentis iomete el sia poezio.

Marjorie Boulton amas ludi per vortoj, kaj ŝia prelego havis la titolon "Prepozicioj petolas, korelativoj kapriolas". Ni lernis, ke ankaŭ gramatike eblas ŝerci.

Ĝenerale la aĝo de la kongresaj partoprenantoj estis sufiĉe alta, sed tion oni ne povis imagi, kiam la granda planko dum la Skota Balo pleniĝis per treege gajaj rildancantoj.

Jen nur kelkaj eroj el la riĉa programo. La 78-a Brita Kongreso okazos en Richmond 1-4 aprilo 1994.

Barbro Haraldsson

DENASKA KONGRESANO

La jam famaj rakontoj de **Sten Johansson** legataj de li mem kaj de **Ingrid Maier**. Du kasedoj kun pli ol du kaj duona horoj da legado.

120 kr

kun sendkosto kaj varimposto

Esperantoförlaget
Box 7502, 200 42 Malmö
Poŝtĝiro 578-5

Traduku!

Bonega komenco!

Al la unua traduk-defio en *La Espero* 2/93 venis eĉ pli multaj solvo-proponoj ol ni antaŭvidis. Estis vera plezuro trastudi kaj kompari ilin! Nia impresoj estas, ke la ĝenerala nivelo estas tre alta. Espereble la tradukemo estos same granda ĉi-foje. Ni volas denove atentigi, ke estas valora kaj instrua ekzerco traduki kune en grupo, ekzemple dum klubkunveno.

Do, traduku la jenan tekston al bona esperanto kaj sendu vian version al Per

Aarne Fritzon (adreso sur p. 2) antaŭ la 25-a de novembro. Jen la ĉi-foja teksto:

"Börsen sätter nya rekord, onsdagen innebar all-time-high för andra dagen i rad. Samtidigt spår våra konjunkturbedömare fortsatta svårigheter för den svenska ekonomin. Det verkar ofattbart, och det är det också. Den som försöker använda vanligt förnuft för att analysera vad som händer på börsen går ofta bet. Börsen är nämligen just en börs, en marknad där tillgång och efterfrågan bestäms av förväntningar och spekulationer, av drömmare och dårar, spelare och sparare, kalla analytiker och djärva risktagare.

Börsen är alltså ett mått på människors förväntningar. Inte bara på företagens vinster, utan också t.ex. på hur räntorna skall bli. Den som har pengar att placera söker bästa avkastning till minsta möjliga risk. Om han tror att räntan kommer att gå ned, är det inte lika intressant att placera i tillgångar som ger räntor i avkastning. Då letar sig kapitalet till börsen. Och när pengarna söker sig till börsen ökar efterfrågan och kurserna stiger."

(*El Svenska Dagbladet* 14/10 1993)

Ĝis, kaj bonan sukceson!

Per Aarne Fritzon
Bertil Wennergren

Sube sekvas propono de traduko de la teksto en La Espero 2/93. Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn de iu esprimo aŭ frazo. Rondaj krampoj, kiel en "lernejestr(in)o", indikas eblan sed nedevigan aldonon. La ciferetoj referencas al la subaj komentoj. (Se vi malkonsentas pri io, ni bonvenigas viajn komentojn!)

– Io estas fundamente erara/misa, kiam la infanoj devas endome, klasĉambre¹ lerni por la vivo ekstera, okazanta trans la lerneja fenestroj². Tion la infanoj neniam rigardos kiel naturan/Tion la infanoj povas rigardi nur kiel ion nenaturan/Al la infanoj tio devas nepre doni impreson de io nenatura³.

Tion diras Susan Humphries [Suzan Hamfriz]⁴, fame konata⁵ lernejastr(in)o el suda Anglio, sidante en lerneja manĝejo en la nordsveda urbo Kiruna⁷. La personaro de la lernejo Bergaskolan ĵus regalis ŝin per frandaĵoj de la provinco Norda Botnio⁷. Ŝi montras eksteren, al la neĝokovrita lerneja korto, kie la infanoj kaj kelkaj instruistoj konstruis grotojn, kastelojn, aŭtojn, sledetojn, lanternojn kaj alion/ktp. el tiu (ĉi) mirinda/sorĉa materialo, kiu ĉiujare tute senkoste falas el la ĉielo kaj restas dum sep el la dek lernejaĵoj⁸ (de la jaro).

Vintre tiu ĉi lerneja korto estas mirinda ludejo⁹, kie la infanoj povas libere esprimi sian kreaĵon kaj kontentigi sian moviĝemon/bezonon de moviĝo. Somere ĝi estas tute alia: Ventoplena asfalta korto kun kelkaj futbalaj/piedpilkadaĵoj¹⁰ golejoj, flagstango, kelkaj/kelke da tabloj kaj benkoj.

1. "...när barnen ska sitta här inne, i klassrummet, och..." En la sveda estas tre nature esti konkreta en tia ĉi maniero: "sitta och plugga", "stå och hänga", "gå omkring och sura". Oni tamen atentu pri tiaj esprimoj en Esperanto. La parolanto momente ne troviĝas en iu klasĉambre, sed parolas ĝenerale. La esenca afero ne estas, ĉu la infanoj kutime sidas aŭ staras, sed la fakto de enfermiteco. La adverboj donas bonan esperantan stilon.

2. "...lära sig hantera livet därute..." La verbo "hantera" en tiu ĉi kunteksto estas ne facile tradukebla kun la ĝusta nuanco. Ja temas pri tio, ke la infanoj lernu en optimume taŭga maniero alfronti situaciojn kaj cirkonstancojn, kiujn povos prezenti la vivo. Inter la proponoj estis "regi", "manipuli", "trakti" kaj "manovri". El tiuj ĉi, la unua ŝajnas tro aplomba – kiu povas pretendi "regi" sian vivon? "Manipuli", figure uzata, havas nuancon fian, dum "trakti" iel metas tro da distanco inter subjekto kaj objekto. Laŭ ni, "manovri" tre bone kaptas la ĝustan sencon, sed estante verbo netransiitiva, ĝi iom malfacile eniras la kuntekston. Danke ni aprobas la proponitan, genie simplan tradukon "lerni por la vivo", kiu fakte ĉion diras.

3. "Det kan barnen aldrig uppfatta som annat än konstlat." Tiu ĉi frazo prezentas du malfacilaĵojn: sian implikitan penson kaj la stumbligan vorton "konstlat". Ĉiu provo de laŭvorta traduko (simila al "Tion la infanoj neniam povos rigardi alie

ol kiel nenaturan") sonas stranga, almenaŭ en niaj oreloj. Pli rekta esprimmaniero ŝajnas preferinda. La sveda vorto "konstlad" havas plurajn signifojn, kaj kelkaj tradukantoj lasis sin misgvidi de la pli kutimaj sencoj "afektita" respektive "artefarita", kiuj tamen ne taŭgas en tiu ĉi kunteksto, kie "nenatura" estas la sola ebla traduko. Notu, ke "afekti" havas la tute specialan sencon de nesincera kondutmaniero kaj do uzeblas nur pri homoj.

4. Estas rekomendinde sekvi la kutimon de *Monato* interkrampe doni (proksimuman, prefere "esperantecan") indikon pri la elparolo de malfacilaj nomoj kaj nacilingvaĵoj.

5. "...smått legendarisk" Traduko uzanta la vorton "legenda" riskas plene konfuzi tiun leganton, kiu kontrolas la signifon en sia esperanta vortaro. "Konata", "renoma" aŭ "fama" estas korektaj, sed eble ne redonas la precizan nuancon de la sveda esprimo. Laŭ ni, "fame konata" (= konata per famoj, onidiroj) estas trafa traduko. (Ni do ne tute konsentas kun PIV, laŭ kiu "fame konata" estus nur pleonasma sinonimo de "fama" = tre konata al la publiko.)

6. Atentu pri la vorto "rektoro"! Problema jam pro tio, ke ĝia signifo varias de lando al lando, ĝi absolute ne signifas "estro de elementa lernejo".

7. Al internacia legantaro konvenas indiki, ke Kiruna estas urbo kaj ke Norda Botnio estas provinco. Se tio ne evidentiĝas el la cetera kunteksto,


prefere oni ie indiku ankaŭ ke la tuto okazas en Svedio!

8. "...sju av skolärets tio månader" Oni iom atentu. Laŭ PIV, "jaro" estas periodo de iom pli ol 365 tagoj, nenio alia. Ne ŝajnas rekomendinde enkonduki novan specon de "jaro", kiu konsistus el nur dek monatoj, kiel estas pri la sveda "skolår". Fakte laŭ zamenhofa uzo, "lernejaro" estas jaro (= 12 monatoj) pasigita dum lernado. Analoge, "studjaro" aŭ "lerneja jaro" estus 12 monatoj pasigitaj per studado aŭ en lernejo ("Miaj lernejaĵoj estis miaj plej feliĉaj"). Sed ĉiuj povas sen konfuzo kompreni, ke en Svedio dek monatoj el la dekdumonata jaro estas *lernejaĵoj*.

9. "På vintern fungerar denna skolgård som en underbar lekplats..." La traduko "funkcias kiel" estas evitenda, ĉar "funkcii" laŭ PIV estas uzata pri io, kio plenumadas sian intencitan celon, dum la sveda frazo ja signifas proksimume "servas kiel", do "estas uzata kiel", ĉu tio estas la origine intencita uzmaniero aŭ ne. "Funkcii" en tiu ĉi kazo estas bona ekzemplo de t.n. "falsa amiko". Ĝuste la plej kutimaj vortoj povas esti la plej trompaj, ĉar ŝajnas nenecese kontroli ilian uzon en vortaro.

10. "Piedpilkoo" = speco de pilko. "Futbalo/piedpilkado" = speco de ludo. Multaj uzas "piedpilkoo" por nomi la ludon (ankaŭ PIV...), sed tio estas facile evitebla nelogikaĵo.

Krucvortenigmo



Vertikale:

- A. Rigardinstrument'
- B. Brandan – Korinklina
- C. Lav' – Granddimensiaj
- Ĉ. Malgranda metalpeco
- D. Frakcio – membr'
- E. Ankorau ne aperinta
- F. Nomo de viro – Malantaŭaj'
- G. Adam kaj Eva – Kverka
- Ĝ. Femaloj – Insign' de honoro
- H. Grasoriĉa fabo – Paradizo

Kompilis: **Lennart Persson**

Solve de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 2/1993

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	E	L	A	R	T	I	K	I	G	O
2	S	U	K	E	R	P	E	C	O	N
3	P	A	R	T	A	■	L	I	T	O
4	A	S	O	■	K	R	A	D	A	J
5	N	■	P	E	T	O	N	■	N	■
6	■	K	O	L	O	N	■	K	O	L
7	P	■	L	A	R	D	O	N	■	U
8	L	E	O	N	O	■	L	A	M	A
9	E	T	N	O	■	P	I	R	A	T
10	T	E	■	N	I	R	V	A	N	O

Horizontale:

- 1. Pilkosport'
- 2. Epokan – Pagilo
- 3. Inter la ŝtatoj
- 4. Prefikso – Metala miksaĵo
- 5. Helpantoj
- 6. Bru' – Du vokaloj
- 7. Flag'
- 8. Laŭ monopoldona dokumento
- 9. Tapiŝ' – Betulen
- 10. Oficir – Bonfarto

Nekrologoj

Walter Bjerkeno

Walter Bjerkeno el Hässleholm mortis la 27-an de aŭgusto en la aĝo de 78 jaroj. Li estis homo kun multaj interesoj kaj unikaj kapabloj en diversaj kampoj. Sian grandan humanecon li montris i.a. dum UN-servo en Afriko. Li zorgis pri aliaj homoj ne nur praktike, sed ankaŭ plifortigis kaj ĝojigis ilin per siaj sprito, boneco kaj toleremo. Li estis bona rakontanto kaj

ankaŭ pacienca aŭskultanto. Mi estas danka, ke mi havis la privilegion koni lin kaj malĝojas, ke mi jam ricevis la lastan leteron de li.

Anita Bergh



Robert Auer

La 2-an de julio forpasis Robert (Roy) Auer, dungita deĵoranto ĉe Esperanto-Centro de post 1984. Naskiĝinte en 1938, li spertis la militon kiel infano en orienta Germanio. Li ekloĝis en Stokholmo meze de la 50-aj jaroj. Li laboris en la distraĵindustrio, sed devis ĉeŝi pro malbona sano. Dum lia multjara laboro por SEF, membroj tra la tuta lando lernis estimi lin kiel agrablan telefonvoĉon kaj helpeman oficiston.

Per Aarne Fritzon

Sten Svenonius
Vendelsfridsq 4C
21764 Malmö

3/1

Esperantoförbundet, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm

Recenzoj

Gratulindaj petolaĵoj

Astrid Lindgren: Emilo de Smolando. Trad: Kerstin Rhodin kaj Harold Brown. Progreso Eldonejo, Motala, 1993. 71 p. 70 SEK.

Emilo de Smolando estas verkita de Astrid Lindgren – eble la plej konata aŭtoro de infanlibroj en la mondo. Ĝi priskribas la vivon kaj petoladon de Emilo Svensson, malgranda knabo, kiu loĝas en la vilaĝo Lönneberga en Smolando.

La libro enhavas kolekton de etaj rakontoj, kiuj ĉiuj pritraktas la agojn de Emilo. Ili estas amuzaj, ĉarmaj kaj ĉiam montras Emilon kolizii kontraŭ la plenkreskula mondo.

Astrid Lindgren skribas partizane – ni ne povas ne subteni Emilon. Estas li, kiu agas logike kaj bonkore, kaj la plenkreskuloj, kies ideoj pri ordo kaj reguloj estas frenezaj. En la plej konata okazaĵo de la libro, Emilo hisas sian fratineton Ida ĉe la flagstango. Tion li faras nur el afableco, ĉar li volas plenumi sian deziron rigardi la apudan urbon, Marianne-lund. Sed la plenkreskuloj tute ne aprezas tion kaj li ricevas la kutiman punon – esti enŝlosita en la lignajistejo.

Unu interesa afero, kiun mi rimarkis pri la libro, se mi komparas ĝin kun la libroj, kiujn mi legis kiel infano, estas ke la heroo Emilo sufiĉe ofte estas sola. Li ne estas la estro de ia infangrupo, kiu ludas kune. Li plejparte mem decidas kion fari, kaj plenumas tion sen helpo de iu alia. Oni kunsentas la malgajecon de Emilo, kiam li sidas sola en la lignajistejo – kaj ankaŭ sentas tiun malgajecon ŝanĝiĝi al ĝojo, kiam Emilo sukcesas eskapi tra la fenestro.

La esperanta traduko estas flua kaj facile legebla. Oni ne sidas kaj pensas pri ĉiu vortoto, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona

traduko – oni simple traktas la libron, kvazaŭ ĝi estus originale verkita en esperanto, kaj ke tiu estus la hejmlingvo de Emilo. Ida kaj la aliaj smolandanoj. Je la fino de la libro, la tradukintoj aldonas liston de la ĉefroluloj, kaj ankaŭ mapon, kiu montras kie la eventoj en la libro okazas.


La preso eble ne estas tiom altkvalita kiel la traduko. Oni reproduktis la sa-

majn bildojn de Björn Berg, kiuj estas en la originalo, sed ili ne havas la saman efikon, ĉar ili ne estas tiel belaj. Tamen oni devas esti realisma pri kostoj kaj merkatoj en la esperanta mondo. Mi pensas, ke oni devas gratuli la tradukintojn kaj presintojn pro tio, ke ili disvastigas la petolojn de Emilo al la internacia esperantoparolanta publiko.

Ian Wibberley

Nun Emilo petoladas en esperanto!

70 kronoj ĉe
Progreso Eldonejo
Solviksgatan 6
591 70 Motala
Tel: 0141-161 67



El kanto oni vortojn ne elĵetu.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSTITA PER LA LITERTIPO ODENSE]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 Tyresö · Tel. 08-742 83 36 · Fakso 08-712 39 93